

AVENO # 47 - AGADO de AVE kaj de AVEanoj - 2021

Jen ghegeneralaj informoj pri AVE kaj aliaj CSO-oj .
Diversaj peticio-petoj trovighas je Ekologio au je Homaj Rajtoj

Proponita kotizo por AVE estas: 10 EUR jare, pli au malpli eblas.
Nia UEA-Konto: avex-z;
Konto de UEA: IBAN: NL72INGB0000378964, BIC: INGBNL2A
Noto: (de "via nomo" por Kto. avex-z)

Elkoran dankon – Manfred Westermayer, la sekretario.
Adreso: AVE, Kandelstr. 62, 79194 Gundelfingen/Breisgau, Germanio
Retejo de AVE: <http://www.verduloj.org>
Nia eta interreta diskutejo trovighas je Ipernity, tie serchu la grupon "Verduloj"

Ni tradukis la Manifestojn 2014 de la Europaj Verdaj Partioj (trovebla sur www.verduloj.org)
- Federacio de Junaj Europaj Verduloj
- Europa Verda Partio: europeangreens.org
- tutmonda asocio de verdaj partioj: GlobalGreens.org
Nova Esperanto-informejo: kern.punkto.info/arkivo/

La projekto <http://www.lingvo.info> celas provizi informojn pri lingvoj kaj diskonigi plurlingvecon en la interreto ... La retejo estos havebla en almenaŭ 17 lingvoj ekde sia lanĉo.

Internaciaj Ago-Tagoj (nur kelkaj)
01-27 : Rememortago pri la kruelajhoj de la fashismo (liberigo de la koncentro-lagero Auschwitz)
02-21 : Internacia Tago de la Patrina Lingvo
03-08 : Internacia Tago por Virinoj
03-10 : Internacia Tago por la Autonomio de Tibeto
03-21 : Tago de la Mondcivitanoj
03-22 : Internacia Tago por la Akvo
04-20 : Tago de la Tero
05-09 : Europa-Tago
05-15 : Nakba-memortago pri la forpelado de araboj el la nov-fondita shtato Israelo (1948)
05-21 : Internacia Tago por la Kultura Evoluo
06-05: Tago de la naturmedio
06-08 : Tago de la Maroj
06-11 : Internacia Tago de la Lingvoj
11-25: Internacia Tago malhelpi perforton kontraŭ virinoj kaj knabinoj

= ==

2021-12-15 Rearbarigo je monto Tirin'gati, Tanzanio

Mramba Simba (Mazingira-projektaro) komencis la **rearbarigon de monto Tirin'gati** kiu trovighas en sia tereno de 4 vilaghoj (kie li estas vilaghar-estro). Tiu monto iam havis arbaron. Mramba antaŭ du jaroj jam plantis arbidojn je la piedo de la monto; kaj nun intencas daurigi. Mramba mem kultivis arbidojn, kaj chifoje kunagados Sylivester Nyinimbe, estro de arbido-kultivejo, kiu konas multajn plantojn kiuj taugas por chi-tiu monto.

La celo estas unuflanke rearbarigi laueble originale, kaj aliflanke ke oni povas rikolti poste mielon (bredi abelojn) kaj pli poste ankaŭ lignon en la malsupra parto de la monto.

La kostoj ne nur estas la plantoj (multaj jam kreskas en la kultivejo de Mramba), aliajn arbidojn, arbustojn kaj ankaŭ florojn alportos Sylivester, kiu vivas de arbo-kultivado.

Krome necesas kaj kostas gardi la plantajhon dum kelkaj jaroj por komence protekti la arbidojn. Ni kolektas subtenon ghis fino de Februaro, char la plantado-laboro komencighos en Marto; la printempa pluv-sezono komencighas en Aprilo. La kostoj estos iom altaj por atingi vere videblan rezulton; ili bezonas chirkau 2000 USD, de tiu ni jam kolektis la duonon.

Mramba jam utiligas biogason, chefe pere de fekajho de bovinoj, por ne uzi ligno-karbon. Char la produktado kaj uzado de lignokarbo en ne-daurigebla maniero tre kulpas pri senarbarigo de Afriko.

Bonvolu donaci au al la UEA-konto de AVE: avex-z, se vi estas UEA-membro.*

= =

2021-11-10 Peticio al Macron vere malpermesi Glyphosat

Li promesis forigi la pesticidon Glifosato, kiu mortigas abelojn, reduktas la biodiversecon en la grundo, kaj atingas ankau la homojn. La lobiistoj de Monsanto premas la EU-parlamentanojn kaj komisionon. Francio, do fakte la franca prezidento Macron, venontjare mastras la EU-Prezidentecon.

Jen peticio ke li plenumu sian promeson finfine malpermesi Glifosaton:

Pétition: Nous, signataires de cette pétition, exigeons que la France sorte totalement du glyphosate, avec un plan d'accompagnement des agricultrices et des agriculteurs, et s'engage à s'opposer publiquement au renouvellement de l'autorisation de ce pesticide toxique dans l'Union européenne.

Nous vous demandons de prendre immédiatement cet engagement public, composante essentielle de l'objectif plus large d'une sortie accélérée des pesticides de synthèse et de la transition de notre agriculture et notre système alimentaire.

Sur chi-tiu retejo vi povas elekti ankau anglan, germanan, hispanan, italan, kaj polan lingvon:

<https://www.wemove.eu/fr>

--

2021-11-08 **Ekovilaghoj kaj Esperanto**

Ĉe Fejsbuko kaj en Telegram-grupo iuj estas en vigla interŝanĝo por kunigi fortojn kaj energiojn por realigi la ideon de **esperantista ekovilaĝo "Semokorto"** kiu funkcios sub la ombrelo de daŭri-poveco, paco kaj edukado kaj interkonektos en amikeco ĉiujn **Esperanto-domojn** en la mondo!

<http://kunfarejo.frali.bplaced.net/?p=4050> kaj [Ekovilaĝoj en Vikipedio](#)

Amike, Herman

= =

2021-11-06 Per-Esperanto-agado: gelernantoj/gestudentoj en Goma 2021-2022

en Septembro pluraj AVE-anoj kaj aliaj samideanoj subtenis la peton pagi la mankantajn kotizojn por lernejoj au universitatoj de 10 gejunuloj en Goma. Ili skribis leterojn, kiom ili ghojas ke dank al la finpago de la kotizo ili ricevis la notojn kaj eblecon daurigi. (bonvolu vidi la alkrochitan dosieron). Por la nuna lernojarro necesas antaŭpago (eble triono/duono), kaj pro tio mi kunsendas la liston de 13 gejunuloj, de tiuj ankoraŭ 11 bezonas subtenon - kaj petas kore subteni.

Retejo de SBV: bonvolo.net; kaj la blogo: <https://6009aa0823121.site123.me/>

Vi povas transpigi al la UEA-konto de AVE (plejeble antau la monatfino): avex-z;*

= =

2021-11-03 Per-Esperanto-agado: abelobredado, agrikulturado, studado

karaj geamikoj, dank al pluraj el vi ni povis subteni 10 gelernantojn kaj -studentojn en Goma (SBV), krom tio malgranda PV por la katolika universitato UEC en Goma, kie Elisee Byelongo instruas interlingvistikon.

Sekve daurigon de rearbarigo en okcidenta Tanzanio (che Mramba Simba kaj che Sylvester Nyinyimbe),

Denove venis konciza peto de Alphonse WASEKA, SBV en Goma:

Por la sekva jaro serchas subtenon du junuloj: metio-lernanto kaj studento; ili bezonas subtenon por daurigi dum restantaj 2 jaroj:

- Alphonse KUBUYA MALIRO en lernejo pri mehhaniko (mekaniko) - por la dua jaro.

- Grâce Germain WAZIWAZI kiu vizitas la 1an pri ekonomio. En Decembro, li povas viziti la 2an klason. Li flue parolas Esperanton kun bonega akchento.

Jen la konciza raporto de Sylvester Nyinyimbe kiajn diversajn arbojn kaj florojn li plantis - kaj tio estas bone, ĉar unu-sola speco estus monokulturo kiu ne helpus al la biodiverseco - kiu estas bazo de biologia stabileco: "Fruktoj : Citrus sinensis, Citrus reticulata, Citrus lemon, Citrus aurantiifolia, Perisea americana, Mangifera indica, Casimiroa edulis, Artocarpus heterophyllus, Morus nigra, Punica granatum, Annona muricata, Annona cherimola, Passifrola edulis, Carica papaya. Ligno : Khaya anthotheca, Terminalia brownii, Casuarina montana, Cedrela odorata, Abizia lebbeck, Acacia nilotica, ktp.

Floroj : Gxenerale mi plantis diversaj specoj de arboj, floroj kaj ornamoj plantoj.

Mi logxas en Bunda urbo sed ekstere de la urbo centro.(la antauxurboj de la urbo de Bunda).
Jes mi plantis por aliaj homoj. Jes mi uzis agro-forsto kulturon."

Denove: Sylivester celas ampleksigi sian arbar-kultivejon per abelo-bredado kaj produktado de mielo char li havas multajn florojn: Li pretas komenci malgrande, kaj tamen necesas aĉeti plurajn instalajhojn: miaflanke li ricevos 100\$, eble iu povas aldoni por atingi 400 por bona komenco.

Vi povas transpigi al la UEA-konto de AVE: avex-z.*

Bonvolu prefere mencii kion vi volas subteni: abelojn, A. Kubuya, G. Waziwazi.

Anticipan dankon & bondezirojn, amike, manfred

= =

2021-10-4 verdpartiaj EU-parlamentanoj petas malpermesi ghegeneralan akcepton de GMO-plantoj.


Ili petas ke ni skribu al la EU-Komisiono, ke ili ne akceptu la GMO-semojn por la agrikulturo. Mi komprenas, ke nur rilatas al homoj kiuj loghas en EU.

Se vi klikas al la butono "send your submission ..." vi trovighos sur retejo de la Verduloj en la EP. Tie vi povas elekti inter 4 diversaj lingvoj, kaj legi la diversajn argumentojn.

Aldone al via nomo, ret-adreso, posht-kodo kaj lando, vi vidos preparitan tekston kiun vi rajtas amendi se vi volas. Ekzemple mi aldonis: "bonvolu sekvi la principon de antau-zorgo, kaj tial: ..."

Bondezirojn, amike, manfred

----- Weitergeleitete Nachricht -----

Betreff:  The EU could allow GMOs on our fields and plates without safety testing or labelling

Datum: Mon, 04 Oct 2021 11:22:54 +0000 (UTC)

Von: Tilly Metz (Greens/EFA) <act@greens-efa.eu>

Antwort an: act@greens-efa.eu

An: manfred@westermayer.de

... longa angla teksto

= =

2021-09-29 Subteni lernantojn en Goma, kaj arbidojn kaj abelojn en Tanzanio

Alphonse WASEKA de SBV, Goma, tre dankas por chiuj kiuj subtenis la lernantojn kaj studentojn ke ili povas pagi la kostojn por la finanta lerno (alimaniere ili ne ricevas la dokumentojn) - mi sendos al ili leterojn kiujn lernantoj kaj studentoj skribis en sufiche bona Esperanto; plejparte temis pri la kostoj (au mankoj) por la jhus finita lerno. Char la nova lerno komencighas li denove petas subtenon - do, se iu el vi pripensis kaj ankoraŭ ne subtenis, via subteno ankoraŭ bonvenas kaj utilas.

En nord-okcidenta Tanzanio, je la rando de urbo Bunda trovighas la **arbo-kultivejo de Sylivester Nyinyimbe**, mi alkroĉis foton kun li en lia arbo-kultivejo.

Lastan jaron ni subtenis lin per eta sumo de 100 Euro - kaj jen chi-sube lia konciza kaj detala raporto kion li plantis (se iu pretus subteni kaj shatas pli da fotoj - bonvolu skribi al mi). Li skribis ke, en sia arbo-ghardeno estas multaj abeloj, pro tio li pripensis kultivi ilin por rikolti mielon.

Mi proponis komenci per **20 abelujoj**, kompreneble li ankau necesas kelkajn aparatojn. Mi supozas ke 400 Euro sufichos por komenco. Se 20 homoj subtenos po 1 abelujon (20 Euro) - estos malfermo al realigado. Bedaurinde mi ne povas promesi mielon kiel rekompenco.

Vi povas transpigi al la UEA-konto de AVE: avex-z;*

Anticipan dankon & bondezirojn, amike, manfred

Kara Manfred. Saluton. Jes arbidoj bone kreskas. Mi volas komenci per 100 abelujoj. Cxar mi havas suficxe loko kaj natura rimedoj por altiri abeloj.

Laux mi, mi povas komenci per 30 abelujoj, se ne eblas mi povas komenci per 20 abelujoj laux vi.

Mi ne posedas abelujoj. Sed cxiam la abeloj venas kaj loghas en mia arboj.

Jes mi jam lernis kiel tio funkcias. Ankau mi povas uzi abeloj profesiuloj por konsiloj.

Mi certe scias ke abeloj de tempo al tempo kreas novajn popolojn.

La arbidoj kiun mi plantis :

Fruktoj : Citrus sinensis, Citrus reticulata, Citrus lemon, Citrus aurantifolia, Perisea americana, Mangifera indica, Casimiroa edulis, Artocarpus heterophyllus, Morus nigra, Punica granatum, Annona muricata, Annona cherimola, Passifrola edulis, Carica papaya.

Ligno : Khaya anthotheca, Terminalia brownii, Casuarina montana, Cedrela odorata, Abizia lebbeck, Acacia nilotica, ktp.

Floroj : Gxenerale mi plantis diversaj specoj de arboj, floroj kaj ornamoj plantoj.

Mi logxas en Bunda urbo sed ekstere de la urbo centro. (la antauxurboj de la urbo de Bunda). Jes mi plantis por aliaj homoj. Jes mi uzis agro-forsto kulturon.

= =

2021-09-24 **ECI - Abeloj kaj Bienuloj bezonas vian subtenon**

Karaj, eble vi jam subskribis chi tiun European Civitanan Iniciativon por finfine malpermesi GLYPHOSAT de Monsanto kaj shanghi la agrikulturan politikon al pli natur-afabla versio. La kolekto-dauro validas ghis la 30a de Septembro - do, urghas.

Se vi estas civitano de EU kaj ankoraŭ ne subskribis, bonvolu fari nun. Jen la ligiloj en diversaj lingvoj - tie vi trovos la 3 chefajn celojn de chi-tiu iniciativo:

Deutsch — [bienenundbauernretten.de](https://www.bienenundbauernretten.de)

Français — [savebeesandfarmers.eu/fra/](https://www.savebeesandfarmers.eu/fra/)

Español — [savebeesandfarmers.eu/spa/](https://www.savebeesandfarmers.eu/spa/)

English — [savebeesandfarmers.eu](https://www.savebeesandfarmers.eu)

Italiano — [savebeesandfarmers.eu/ita/](https://www.savebeesandfarmers.eu/ita/)

Nederland — [redbijen.nl](https://www.redbijen.nl)

eblas ankau en la pola kaj romana: [Polnisch](#) und [Rumänisch](#) .

= =

2021-08-11 denove Per-Esperanto-agado

nun la plej granda projekto de nia per-Esperanto-agado estis finita: bona trinkakvo por ch. 18.000 homoj en Kalima /DR Kongo. Ankoraŭ 14.000 atendas, kaj PIEADC plejparte povos realigi pliajn pashojn. Koran dankon al chiuj kiuj kune laboris, pripensis kaj donacis. La plej granda donaco, ch. 50 mil, venis de la germana registaro (ministerio pri ekonomia kunlaboro) fakte organizata de privata fonduso EZ-Kleinprojekte. Aliaj grandaj subtenantoj estis fondusoj de dungitoj de germanaj firmaoj (Robert Bosch kaj Daimler AG - chi-tiu firmao ech duobligis la sumon) kaj sen la kunlaboro de germanlingva asocio Direkthilfe für Kleinprojekte e.V. ni ech ne havus la eblecon peti pri tiaj subtenoj. Finfine ankau multaj el VI subtenis, char propra kontribuo chiam necesas por atingi tiajn subtenojn. Koran dankon al chiuj :)

--- Nun mi prezentas tri malgrandajn projektojn, sed por tiuj mi ne havas germanan asocion kiel organiza subtenanto. **Rearbarigo de monto Tirin'gati, Tanzanio:**

Mramba Simba komencis la rearbarigon de monto Tirin'gati kiu trovighas en sia tereno de 4 vilaghoj (kie li estas vilaghar-estro). Mi aldonas lian raporton kaj foton de tiu monto, kie iam estis arbaro. Mramba jam komencis antau du jaroj je la piedo de la monto; kaj nun intencas planti diversajn arbidojn, kiujn li jam kultivis. Krome necesas kaj kostas gardi la plantajhon, por protekti la arbidojn.

Fotovoltaiko-projekto je UEC, Universitato de Espero en DR Kongo (kristana / metodista). Nun chi tiu universitato havas esperantistan administranton, Elisee Byelongo. La celo estas krei tie la unuan universitatan kurson pri interlingvistiko en Afriko. Sed la problemoj estas senfinaj; la unua estas manko de elektro. La malnova benzine funkcia generilo rompighis kaj nun ni pensas instali sunpanelojn. Jen la bazaj informoj en Vikipedio:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Universitato_Espero_de_Kongo

Agrikultura projekto de Joel Muhire, Rutshuru (D.R. Kongo):

Ni luprenis kampon per pruntita mono, ne malproksime de mia hejmo kaj ni intencas ensemi fazeolojn kaj maizojn, legomoj estas postulaj kaj ne donas multan monon tie ĉi. Akvo por akvumi

ne necesas, sufiĉas la pluvo.

Rondo Esperantista de Kiwanja havas nun proksimume 40 membrojn, ĉar la varbado daŭras.

Mi kreskis kultivante, studis pro agrikulturo. Peto de AVE:

mi petas vin subteni unu el tiuj du projektoj - chiu bezonas 1 - 2 mil US\$ - ni jam havas 200.

- rearbarigon en Tanzanio enkadre de la projektaro Mazingira

- instali fotovoltaikan sistemon (PV) por anstataui benzinan kurento-generatoron, je UEC

Plej simple vi povas transpigi al la konto de AVE che UEA: avex-z*

Se vi ne estas membro de UEA vi povas transpigi al mia persona konto:

Bonvolu noti kion vi subtenos: "rearbarigo" au "PV por UEC" au ghenerale por nia "CDE"

(ne forgesu doni vian nomon je pago al avex-z)

Koran dankon pro via kontribuo.

= =

2021-08-04 Diskuto pri estonteco de Europo - kio gravas - niaj proponoj

Jen denove - kion mi jam sendis la 13a de Junio:

Ĉu vi jam vidis la proponon de Seán Ó Riain: The EU needs improved language learning <https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/23893> kiu pledas por grandskala elprovo de la esperantlingva projekto Multlingva Akcelilo en bazaj lernejoj?

Se vi konsentas kun tiu propono, bonvolu apogi ankaŭ ĝin! Antaŭdankon, Klaus

<http://futureu.europa.eu/conversations/11266>

Tie vi trovos ankaŭ 34 aliajn proponojn - serchu „Esperanto“.

La strategio estas interesi la teamon/panelon kiu poste elektos el la temoj, kaj proponos ilin al la Europa Parlamento.

= =

2021-07-18 AVE che Virtuala UK

karaj geamikoj, si vi partoprenas la Virtualan UK, VK vi eble jam trovis okazajhon de AVE:

Tempoj: MEZS - mez-europa somera tempo, lau Parizo/Berlino ktp.

Lundo 19a de 10:00 - 10:55, AVE che Movada Foiro.

Merkredo, 21a de 14:30 - 15:xx, publika kunveno de AVE, krom gheneralaj informoj pri AVE kaj nia agado kun la Verdaj Partioj (koncize), vi vidos & audos pri Klimato (aparte pri la interago kun grundo, MW), kaj pri Lobiado kaj Klimato en Usono, de Michael Leibmann. Eblas diskuti.

Merkredo, 21a de 18:00 - 19:00, AVE che Movada Foiro. Mi ghojus renkontighi kun vi tie.

Bondezirojn, amike, manfred

= =

Karaj

Jen la aktuala programo laŭ nia reta agendo: <https://gresillon.org/agendo>

Por ajna demando skribu al: gresillon@gmail.com aŭ kastelo@gresillon.org

Bert ŜUMAN

= =

2021-05-23 **virtuala kunveno de AVE**

kiel kutime ni kunvenas enkadre de la kongreso de la Germana Esperanto-Asocio, kaj chijare kune kun la Pola Esperanto-Asocio.

Nia kunveno okazos je Dimanĉo 23a de Majo, 15:15 - 16:30 (mez-europa somera tempo).

Krom koncize raporto pri nia agado ni havos tempon diskuti.

La aligho estas senkosta; jen vi trovas la alighilon:

www.esperanto.de/eo/enhavo/ali%C4%9Ddoanmeldung-germana-pola-esperanto-kongreso-2021

= =

2021-04 **la lingvo-reguloj en Europa Parlamento**

Chi tiun dokumenton vi trovos en ch. 24 naciaj lingvoj - simple elektu en la supra linio:

<https://www.europarl.europa.eu/about-parliament/de/organisation-and-rules/multilingualism>

2021-05-02 **Diskutrondo de AVE & EELV pri energio kaj klimato**

ni diskutos denove morgau vespere 2021-05-02, je 18a horo, Amsterdam ... (pri la Zoom-ligilo vidu sube) pri la uzado de karbo - chefe por produkti kurenton - ene de EU; la plano eliri el la karbo

estas tre/tro longtempa - aliflanke paralele necesas evolui/investi en alternativoj. Chiuj alternativoj havas siajn limigojn. Ni volas kompreni kio eblas, kio estas prioritatoj.

Kompreneble tiu temo gravas por la tuta mondo. Ankau Barato, Chinio, ... Usono ktp. tre dependas de karbo. Sed nia klimato - oni devus/volas limigi la plian altighon de averagha temperaturo al 1,5 gradoj (kompare kun la jaro 1900) - reagas nur al tiaj emisioj (ne al la paroloj de politikistoj).

= =

2021-03-18 Karaj geamikoj,
jen bona propono de Renato Corsetti - se mi ne eraras - proponi almenau 1 lecionon de Esperanto en chiu lernejo. Mi mem spertis tion de mia instruisto de la germana lingvo, Guido Holz. Dauris plurajn jarojn kaj kroman instigon ghis tiu semo ghermis.

Bonvolu subteni chi-tiun peticion:

https://secure.avaaz.org/community_petitions/en/Teachers_and_Esperantospeakers_To_have_one_lesson_about_Esperanto_in_schools/

- ---

= =

2021-03-15 Verduloj en Telegram

dank' al iniciativo de Rochjo, AVE nun havas diskutejon en Telegram.

Dank' al Yves ni estas facile troveblaj per jenaj ligiloj:

ave.telegramo.org

verduloj.telegramo.org

ambau ligas al ĉi tiu grupo <https://t.me/verduloj>

Nia grupo "Verduloj" en Ipernity restas dume, char tie eblas prezenti fotojn.

- -

2021-03-16 TAKE raportas pri "Akvo por Kalima"

Ĵus aperis la 88-paĝa kajero 2021 de "Konstruado", publikaĵo de Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj (TAKE). Ghi enhavas raporton pri la teknikajhoj de "Akvo por Kalima", subtenata ekde 2013 de AVE-anoj.

<http://take.esperanto.free.fr/france/take.htm>

Vikipedio : https://eo.wikipedia.org/wiki/Tutmonda_Asocio_de_Konstruistoj_Esperantistaj

La jaraj libroj (ek de 2021 ?) estas haveblaj de la asocio, kaj en bonaj bibliotekoj.

Kaj jen videa informo pri la diversaj temoj de Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj.

Video : <https://www.youtube.com/watch?v=GhApuBkP3ZM>

(dankon al Henri Masson - kaj aparte al tiuj kiuj faras la eldon-laboron)

= =

Privata Fonduso: 2020-10-30 por **Indien, Sri Lanka und Nepal**

Projekte zur Aus-/Weiterbildung

und zur Schaffung einer nachhaltigen Lebensgrundlage oder zur Selbstversorgung

im Handwerk oder in der ökologischen Landwirtschaft bzw. Gärtnerei

Gefördert werden nur Projekte, wenn sie eindeutig auf Initiativen der lokalen Projektpartner/Begünstigten beruhen.

Die von der Schöck-Familien-Stiftung geförderten Projekte sind der Gemeinnützigkeit verpflichtet.

Der Förderzeitraum beträgt 2 Jahre. Anschlussförderungen und längerfristige Partnerschaften sind grundsätzlich möglich.

Die Fördersumme beträgt maximal 25.000 € pro Projektjahr.

Gerne können mit dieser Summe auch erforderliche Eigenmittel für BMZ-geförderte Projekte gedeckt werden. <https://schoeck-familien-stiftung.eu/ausschreibungen>

= = =

2021-03-09 telegramo.org nia estonta babilejo pri ekologio

Kelkaj el vi partoprenis nian babilejon en Ipernity. Bedaurinde Ipernity.com ne plu uzas Esperanton kiel laborlingvo - kaj UEA ne povis pagi pro chi-tiu servo. Aliflanke nia grupo "Verduloj" estas uzata de nur malmultaj.

natur.telegramo.org - chefe traktas ekologion en Esperanto.

Por diskuti pri partiaj temoj mi jhus kreis la grupon

Verduloj.telegram.org - ni vidos chu tie estighos pli vigla diskutado.

La avantaĝo estas ke oni povas pli bone postsekvi la diversajn opiniojn kaj diskuti pli libere. Mi invitas vin partopreni.

Por informi ni tamen uzos nian novajhleteron AVENO; vi povas postsekvi ghin en nia retejo:

verduloj.org/aveno.htm

= =

2021-02-04 **Forpasis Ute Haas**

shia filino informis min ke Ute mortis en Decembro 2020.

Jen dedicho por Ute de Wolfgang Guenther en la germana kaj sube tradukite:

"Als wir Esperantosprecher aus Irland, Belgien und Deutschland 1984 AVE gründeten, war Ute wohl die, die am klarsten und eindeutigsten verstanden hatte, dass Ökologie bedeutet, sich konsequent für das Leben im Sinne von all dem, was lebt auf unserem einen Planeten, einzusetzen.. Deshalb ihr lebenslanges Eintreten für den Tierschutz. Jenseits vom Umwelt- und Klimaschaden, den der übermäßige Fleischkonsum unserer Gesellschaft anrichtet, ist der Respekt vor dem Leben an sich und die Vermeidung von Leid der Tiere ein ethisches Prinzip, das Ute vorbildhaft auch im Detail vorgelebt hat und an das wir uns immer erinnern, wenn wir an sie denken."

Koncize - kaj ankaŭ pli aktuale pri Ute:

Kiam 1984 ni parolantoj de Esperanto fondis AVE, Ute certe estis tiu kiu plej klare kaj konsekvente komprenis ke Ekologio signifas engaghi por la vivo, en la senco de chiu vivantajhoj sur nia planedo. Tial shi dumvive engaghis por bestoprotektado. Krome shi ofte subtenis la Per-Esperanto-Agadon de AVE. Shi restos tre pozitive en nia persona kaj asocia rememoro.

--

2021-02 **pri lingva situacio en EU** - dokumento de la komisiono Esperanto de EELV

La tre aktiva grupo de samideanoj en la franca Verda Partio, EELV, verkis kontribuon por la programo kadre de la franca baloto 2022. En la partio ekzistas programo Bien Vivre kiu enhavas la temon, kaj jam 1999 ili enmetis la temon lingvo-politiko por la Europa Programo.

Jen la ligilo al la dokumento en la franca kaj en Esperanto. Se vi miras pri la menciita granda nombro 85 da lingvoj ene de EU - bonvolu sekvi la ligilon sub la nombro (al franca wikipedio):

<https://esperanto.eelv.fr/les-langues-en-europe-une-situation-discriminatoire-et-anti-democratique/>

*) por ne legi tion plurfoje: Se vi ne estas membro de UEA vi povas transpigi al mia persona konto: Fakte mi transpagos entute al la niaj afrikaj samideanoj, char UEA ne plu faras tion ??

Manfred Westermayer, Weissdornweg 68, 53117 Bonn, Volksbank Freiburg, IBAN DE31 6809 0000 0007 8681 11, BIC GENODE61FR1

-- fino --